

esperanto sub — LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

septembro - oktobro 2006 • numero 83 | volumo 14 - numero 5



Kelkaj membroj de la nova Esperanto-Kafo-Klubo Torquay

(fotita de Andrew Lutz ĉe Anita's Guesthouse
en Torquay, Vik.)

(detaloj sur paĝo 23)

ISSN 1039-9380

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO ASOCIJO

N^o 82 • Vol 14.5 • sept.-oktobro 2006

Redaktoro: Donald Broadribb

ELDONADO

Ĉi tiu numero estis kompostita kaj aranĝita de Donald Broadribb, per komputilo iMac, uzante la programon Mellel, kaj la tiparojn Futura, Onyx kaj New Century Schoolbook.

ABONOJ & PASINTAJ NUMEROJ

Abono kostas Aŭ\$40. Pagu al Libro-servo de AEA, 143 Lawson St., Redfern NSW 2016 • Aŭstralio.

libroservo@esperanto.org.au

Por membroj ekstraj ekzempleroj de *Esperanto sub la suda kruco* kostas \$A3.00 + poŝtsendokosto.

Pasintaj numeroj ankaŭ surrete elŝuteblas ĉe:

<http://www.esperanto.org.au/>

Esperanto sub La Suda Kruco estas aŭtomate sendata al ĉiuj membroj de AEA kaj NZEA — pliaj informoj sur paĝo 31 de ĉi tiu eldono.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio

☎(08)96411937 • 📠(08)96411134

esk@esperanto.org.au

Pri opinioj aperantaj en ĉi tiu eldono respondecas la aŭtoroj. Ili ne nepre spegulas la opiniojn aŭ de AEA, aŭ de NZEA.

© 2006, AEA & NZEA — ĉiuj rajtoj rezervitaj.

La grafikan aspekton de la formato de *Esperanto sub la Suda Kruco* preparis Igor de Oliveira Couto.

En Ĉi Tiu Numero

Ĉu fama esperantisto estis spiono? (Trevor Steele)	3
Pri la kurso ĉe la Universitato de NSW (Mateo Maguire)	5
Morto de Edna Turvey	7
Ordeno de verda plumo	7
Recenzo: <i>Making World Peace Real</i> (Renato Corsetti)	7
Recenzo: <i>La vintra fabelo</i> ((☞☞))	8
Recenzo: <i>La lando de la blinduloj</i> (☞☞)	9
Negrandaj informoj atentindaj	
Anekdoto vera ((☞☞))	10
Interesaĵo el Ĉinio	10
Korekto	11
Kongreso 2007 de NZEA	11
Urbestro vizitis la Manlian klubon (Anthony Gaskell)	11
Interrete	12
Krizo por Esperanto en Aŭstralio (Henry Broadbent)	12
Fari kion mi ŝatas, en kio mi kredas (Sandor Horvath/Katja Steele)	13
Honore al Adam Lindsay Gordon (Franciska Toubale/John Adams)	15
Informo pri la informoj pri la somer- kursaro (Marcel Leereveld)	17
Reguloj por AEA kursaroj (Marcel Leereveld)	18
Preskaŭ pasis kvindek jaroj (László Farkaš)	22
Skribas la legantoj:	
Paul Desailly	22
Miranda Lutz	23
Nova klubo en Torquay Vic.	23
Libroservo: ĉu financa profito estas la plej grava afero (Nicole Else)	24
Libroservo: necesega por ni (Donald Broadribb)	25
La celoj de la Asocio (Miranda Lutz) ...	26
Helpe bezonata (Ruben' Torres)	27
La dua medalo de toleremo	27
Radio 3ZZZ	28
La enkonduko de Esperanto en Indonezio (Dianne Lukes)	29

Ĉu fama esperantisto estis spionestro?

de Trevor Steele

El aŭstraliaj esperantistoj nur du, laŭ mia scio, estis eminentaj en la politika vivo. Unu estas Kep Enderby, iam grava ministro en la registaro de Whitlam (1972-1975); post sia emeritiĝo Kep lernis Esperanton kaj estis la prezidanto de UEA de 1999 ĝis 2001. La alia eminentulo estis Ralph Harry, kiu rolis kiel la ambasadoro de Aŭstralio en diversaj landoj, laste ĉe UN. Ralph estis prezidanto de AEA sed ne deziris organizan rolon en UEA.

Pro sia diplomata rolo kaj fervoro pri Esperanto Ralph estis dum jardekoj simple “nia eminentulo”. Foje oni flustris, ke li iam rolis sur la obskura kampo de spionado, sed li ĉiam neis tion. Specife li ĉiam diris pli-malpli: “Ne, mi neniam laboris ĉe ASIO.” Aŭstralianoj scias pri ASIO, (*Australian Security Intelligence Organisation*, simila al la brita MI5 kaj la usona FBI). ASIO celas fakte “kontraŭspionadi”, tio estas, observi kaj neŭtraliigi la agadon de fremdlandaj spionoj kaj iliaj komplicoj en Aŭstralio.

Tiu neo de Ralph pravis. Sed li zorge elektis kion nei. Fakte li estis de 1957 ĝis 1960 ne ASIO, sed ASIS (*Australian Secret Intelligence Service*). Tiu ĉi “servo” estas pli laŭ la modelo de la usona CIA: Ĝia rolo ne estas protekti la hejmlandon, sed infiltriĝi en fremdajn

spionorganizaĵojn kaj provi sekrete influi alilandajn registarojn en maniero supozata utila al la “naciaj intereso” de Aŭstralio. Ofte temas pri kontraŭleĝa agado en tiuj landoj kaj disvastigo de “misinformoj” (mensogoj). ASIS estis tiel sekreta, ke ĝia ekzisto ne estis konata ekster la propraj vicoj ĝis 1972, do dudek jarojn post ĝia fondiĝo. Nia Ralph volis daŭrigi tiun tradicion de sekreteco, kaj neis sian iaman rolon eĉ post apero en 1989 de libro¹, kiu tre klare dokumentis la historion de ASIS kaj la rolon de Ralph.

La libro havas la titolon *Oyster* (*Ostro*) kaj estis verkita de du ĵurnalistoj Brian Toohey kaj William Pinwill. La alikaze sensenca titolo aludas al unu el la kodvortoj, kiujn la funkciuloj uzis por nomi la sekretan organizon. Tuta ĉapitro havas la titolon *The Harry Interregnum* (*La intera periodo Harry*). Ralph estis antaŭe diplomato, kaj oni elektis lin pro tio, ke la oficisto de ASIS, kiu laŭ rango estintus la logika estro, kverelis kun la ministro pri eksterlandaj aferoj, do “nova vizaĝo” estis bezonata. Pluraj ASIS-funkciuloj ekŝiĝis proteste pri la trudo de “eksterulo”, kaj oni

¹. Brian Toohey and William Pinwill: *Oyster, The Story of the Australian Secret Intelligence Service*, WHA, 1989.

povas supozi, ke Ralph ne ĝuis senprobleman periodon.

Eĉ al la aŭtoroj de la libro, kiuj povis montri al li amason da koncernaj dokumentoj, Ralph neis sian rolon ĉe ASIS. Kial? Eble li volis forgesi tiun parton de sia vivo, ĉar laŭdire li tre volonte reiris al “legitima diplomatio” en 1960.¹ La ĉefa agado de ASIS dum tiuj jaroj 1957-1960 estis kunlabori kun CIA en preparado de la puĉo de indoneziaj militistoj kontraŭ Sukarno: eble oni forgesis, ke la sukceso de tiu puĉo enkondukis unu el la plej grandaj masakroj de la 20a jarcento kaj la longan diktatoran regadon de la ege koruptita generalo Suharto. Sed Suharto ja estis “amiko de Usono”.

Toohy kaj Pinwill donis skizon de la kariero kaj karaktero de Ralph Harry. La unua epiteto pri li estas “Esperanto-parola diplomato”. Krome ili citas teatraĵon, kiun Ralph verkis kaj surscenigis en Esperanto, *La duobla agente*. La ĉefa ideo de tiu teatraĵeto estas, ke spionado povas esti valora gardilo de monda paco: nur spionoj kun aliro al la regantoj de “malamika” lando scias, ĉu tiuj regantoj honeste deziras pacon aŭ ne. Ralph donis la ekzemplon de la spiona agado de Gunter Guillaume, la

privata sekretario de Willy Brandt², kiu informis siajn ĉefojn en Orienta Berlino, ke Brandt sincere deziras paciĝon kun la ŝtatoj de la soveta bloko. Guillaume estis multe pli fidinda fonto ol la oficialaj instancoj de FRG³.

Min persone tre interesas, ke la aŭtoroj tiris grandan parton de sia materialo pri Ralph el artikoloj, kiujn li verkis por *New Leaves*, periodaĵo, kiun mi mem eldonis, financis, kaj parte verkis en la jaroj 1986-8.

New Leaves bonvenigis alternativajn ideojn sur ĉiuj kampoj (ĉiam aperis artikolo pri Esperanto kaj ekzercoj pri la lingvo). Ralph kontribus per diversaj artikoloj kaj, kiel konstatas Toohy kaj Pinwill, lia artikolo *A National Covenant for the People of Australia (Nacia kontrakto por la aŭstralia popolo)* metis lin en la kategorion de “verdujoj” kaj “pacaktivuloj”. Tiu “Nacia Kontrakto” antaŭvidis senklasan socion, specialajn rajtojn por aborigenoj, kaj protektadon de la flaŭro kaj faŭno. Kun tiaj vidpunktoj — la aŭtoroj atentigas — Ralph ne ricevintus “security clearance” (aliron al nacie konfidencaj informoj) antaŭ tridek

¹ Ralph Harry diris al mi, en privata konversacio, ke li devis ĵuri sekretecon de sia ASIS-ado kiel kondiĉon de sia enposteniĝo en ĝi. Kaj ke li neniam ASISe uzis informojn akiritajn per lia Esperanto-agado. — [B]

² Willy Brandt (1913-1992): kanceliero de Okcidenta Germanio (1969-74); ricevis en 1971 la Nobelpremion pri paco pro strebado plibonigi la rilatojn inter komunismaj kaj nekomunismaj landoj.

³ *Federal Republic of Germany (Federala Germana Respubliko, t.e. Okcidenta Germanio)*.

jaroj.

La aŭtoroj pravis en sia diro, kaj mi mem spertis, ke almenaŭ dum multaj jaroj poste Ralph estis neniel “verdulo”. Dum la milito en Vjetnamio li estis la aŭstralia ambasadoro en tiu turmentata lando, kaj iam en la tre fruaj 1980-aj jaroj li vizitis min en Brisbano. En tiu tempo li tre bedaŭris, ke “ni” perdis en Vjetnamio ne pro tio, ke “nia” kampanjo estis dekomence mensoga kaj subprema, sed pro tio, ke “ili” (la kontraŭusonaj vjetnamoj) pli ruze utiligis la amaskomunikilojn de la mondo kaj agis pli senskrupule ol “ni”. Mi devis mordi mian malsupran lipon por eviti kverelon tiun belan tagon en Brisbano. Sed en *New Leaves* Ralph skribis (kaj la citaĵo enkondukas la ĉapitron pri li en *Oyster*): “Grandparte la *malaise*¹ de la post-1945a-mondo rezultas el la manko de ideologia toleremo”. Tio

estas ambaŭflanka riproĉo, tute ne akorda kun lia iama sinteno pri la milito en Vjetnamio.

Kiuj vidpunktoj do esprimis tion, kion Ralph vere sentis? Mi volonte kredus ke li, almenaŭ parte pro tio, ke li tiris profundajn konkludojn el sia esperantismo, evoluis en la lastaj jardekoj al pli universala kaj humana mondkoncepto.

Cetere, Toohey kaj Pinwill venis al tre negativa juĝo de la agado de ASIS. Ili opinias, ke ĝi estas, kaj etike kaj surbaze de la magraj rezultoj, foriginda. Unu el la ĉefaj emeritaj oficistoj diris al la aŭtoroj: “Ni akiris de tempo al tempo ion [prispionadan materialon], sed nenion, pri kio vi volus trarompi la pordon de la ĉefministro”. Ankoraŭ alia eksa ASIS-ano diris, ke la plej elstara atingo de ASIS estis, ke ĝia ekzisto restis sekreta dum tiom da jaroj...

[Represita el *La gazeto* n-ro 121.] □

¹ Fr.: malsano, malbona etoso..

Pri la kurso ĉe la Universitato de NSW de Mateo Maguire

Je la pasinta semajnfino mi ĉeestis kunvenon de la esperanta klubo de Manlio, kaj mi aŭdis pri la lastatempaj novaĵoj rilate al la instruado de Esperanto en Sidnejo. Mi voletas gisdatigi ĉiujn pri tiuj ekciataj evoluoj.

Estas nun 2 apartaj kursoj okazantaj ĉe la Universitato de Nova

Sud-Kimrujo. Kiel estis antaŭe raportite en *ESH*, unu el tiuj kursoj komenciĝis en Aprilo, kaj celas tiujn kiuj deziras instrui Esperanton. Ĝi celas instrui instruistokurson, kaj donas al siaj studentoj gravan ilon por la instruado de lingvoj ĝenerale, kaj Esperanto specife. La aktualaj partoprenant-

oj estas Igor, Nicole kaj Miranda.

La dua kurso estas nova kurso, kaj ĝi estas por komencantaj studentoj kiuj volas lerni Esperanton. Ĝi komenciĝis en Julio kaj daŭros por 9 semajnoj. Jam estas 11 studentoj registritaj en la kurso, ĉiuj lernantaj Esperanton. La kurso estas parto de la Fako de Modernaj Lingvoj ĉe la Universitato de Nova Sud-Kimrujo. La kurso okazas ĉiun merkredan vesperon de 18:15 ĝis 20:30. Tiu komenca kurso estas nuntempe eksperimento, sed ni esperas ke la universitato daŭre

ofertos ĝin estontece.

Aparte de instrui Esperanton al novaj esperantistoj, la komenca kurso permesas al la studentaj instruistoj la eblecon ekzerci sin pri la instruistaj lertoj kiujn ili gajnis ĉe la instruista kurso. Kompreneble tio estas valorega sperto por niaj novaj instruistoj.

Tiuj du kursoj estas bonega paŝo antaŭen, ĉar mem evidentas, ke havi altkvalitajn instruistojn tute nepras por progresigi kaj kreskigi la movadon. Ni laŭdu kaj subtenu tian bonan laboron. □

Morto de Edna Turvey

Kun granda bedaŭro ni raportas ke Edna Turvey mortis dimanĉe la 30an de julio je la 7a vespere. La filino Ruth estis kun ŝi, kaj kelkaj amikoj el Redfern, sed bedaŭrinde Ĉo (la edzino de ŝia filo Alan) kaj

la infanoj estis in Koreo ĉar la patrino de Ĉo estas en hospitalo pro problemoj rilate ambaŭ genulojn.

Ni aperigos nekrologon en la septembra *ENK*. □

Ordeno de verda plumo

Post du jaroj da intensa laboro, en kiu partoprenis kunlaborantoj el pli ol 30 landoj, aperis leksikono pri esperantlingvaj verkistoj, sub la titolo *Ordeno de verda plumo*.

Oficiale ĝi estis prezentita en la ĉi-jara UK en Florenco.

Amplekso: 272 paĝoj

Ĝi enhavas 901 biografiojn, 461 fotojn kaj 248 pseŭdonimojn

Formato: 24,5 x 17,5 — luksa papero — fortika bindo

Eldonisto: Grafokom kunlabore kun EVA (Esperantlingva Verkista Asocio)

Prezo: 30,00 eŭro + poŝtkostoj

Mendoj kaj pagoj per internacia poŝtmandato al la kompilinto:

Josip Pleadin, B. Jelacica 138 A, HR-48350 Djurdjevac, Kroatio

Mendoj sen samtempaj pagoj ne estos traktitaj.



• Recenzas Renato Corsetti

Paul Desailly: *Making World Peace Real – The Principle of a Universal Auxiliary Language*, senpage havebla ĉe: http://www.bahaindex.com/documents/Making_World_Peace_Real.pdf aŭ kontaktu la jenajn ret-adresojn: <howardperkins59@yahoo.com.au> aŭ <pauldesailly@hotmail.com> por interkonsenti pri ekzemplero surpapera aŭ surdiska.

Mi ne estas religiano, ĉar mi ne havas mistikan menson. Mi iusence restis ĉe la grekaj filozofoj de tiu tempo, kiam ili malkovris ke la tiamaj homsimilaj dioj ne vere ekzistis, kaj ne sciis kion pensi. Kiel ili mi ne scias, kion pensi, kaj mi ne hontas diri tion.

Sed, malsame al multaj senreligiuloj, mi pensas, ke religio estas faktoro tre grava por la evoluo de la homo kaj de la homaro. Mi kredas, ke malgraŭ ĉio ĉiuj religioj kontribuis spirite evoluigi homojn kaj pliĝentiligi ties instinktajn kutimojn. Cetere, post multaj mensaj akiroj homoj komencis kompreni ke dio estas unu. La posta paŝo estas kompreni ke la dio de islamanoj kaj la dio de kristanoj kaj la dio de la plej praa tribo en Amazonio estas la sama. Tio estas la konkero de la lastaj jarcentoj, kaj la baha kredado estas unu el la unuaj torĉo-portantoj de ĉi tiu nova kaj provizore fina koncepto pri dio.

Mi tre simpatie rigardas al tiuj

homoj en Persujo, kiuj en la profunda islama konservismo de tiu epoko kapablis koncepti kaj diri tiel avangardan ideon. Ne hazarde oni mortigis, torturis kaj ekzilis ilin. La ideo estis tro granda por esti akceptebla de konservemaj tradiciuloj tiam kaj ankoraŭ nun.

Sed mi pli multe parolas pri miaj ideoj pri religio ol pri ĉi tiu libro. Mi ja rajtas paroli pri la enhavo de ĉi tiu libro, ĉar mi same kiel la grandaj figuroj de la baha kredado opinias, ke Esperanto estas la lingvo por igi la homaron unu familio kaj por akompani ĉiujn aliajn procedojn, kiuj espereble portos al paca mondo.

Bedaŭrinde estas tro malmulte da bahaanoj en la mondo, kiel la perfortaj atencoj kaj militoj ĉiutage montras al ni.

Mi ne havas ion por diri pri la kolektoj de diroj pri la problemoj de unu lingvo kaj unu skribo fare de Bahá'ulláh, Abdul-Bahá, Shoghi Effendi, la Universala Domo de Justeco kaj aliaj bahaaj instancoj kaj individuoj. Ĝi estas la plej kompleta kaj la plej racie aranĝita, kiun mi iam ajn vidis. Paul, evidente, longe kaj detale studis la tutan bahaan literaturon.

Kaj mi ne havas ion por diri pri la enhavo de la bahaaj ideoj pri unu lingvo kaj unu skribo. Mi ankaŭ pensas, ke ili estas io absolute necesa. Mi persone kredas ke Esp-

eranto kaj alfabeto bazita sur la internacia fonetika alfabeto povus solvi la problemojn, sed evidente ni estas ankoraŭ malmultaj, kiuj pensas pli mapli simile en ĉi tiu kampo.

Ni estas esence nur la bahaanoj kaj la esperantistoj. Ni ne estas batalantaj inter ni sed kontraŭ la cetera mondo, kiu ignoras kaj la bahaan kredon kaj Esperanton, kaj nur pensas pri potenco kaj mono. Alianciĝi inter ni por plibonigi la mondon estas io nepre fari-nda.

Tre volonte mi faros mian eblon

por atentigi la esperantistojn pri la bahaaj ideoj en ĉi tiu kampo kaj pri la neceso kunlabori kun ili dum Paul Desailly faras sian eblon por atentigi la bahaanojn pri la solvo al la problemo, kiun prezentas Esperanto.

Tiel espereble ni kune kontribuos al la vizio de Bahá'u'lláh pri paca mondo interkompreniĝanta surbaze de justa solvo de la problemo de unu lingvo kaj unu skribo.

Renato Corsetti
Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio


• Recenzas via redaktoro

William Shakespeare: *La vintra fabelo*. Tradukis Humphrey Tonkin. 154p., fortike gluita volumo. Rotterdam: Universala Esperanto-Asocio, 2006.

Takso: 🍓🍓🍓🍓

La vintra fabelo estas inter la plej lastaj el la dramoj de Shakespeare, preskaŭ samtempa kun lia ĉefverko *La tempesto*. La anglalingva originalo estas tekste tre malsimpla. La lingvaĵo de la originalo estas ofte malfacile sekvebla, pro multa obskureco de la vortuzo. Kompreneble multaj aludoj ne plu estas aktualaj; ilin, kaj multajn obskurajn diraĵojn klarigas per piednotoj Humphrey Tonkin.

La originala dramo de Shakespeare estis enteatrigita 1610-



1611.

Kiel eble ĉiuj liaj dramoj, ĝi estis bazita sur verko de alia persono. Ĉikaze, la dramo *Pandosto* (1588) de tiam bone konata aŭtoro Thomas Greene.

Ne mirigu nin ke Shakespeare kvazaŭ plagiatis la pli fruajn dramon. Tiuepoke plagiato estis ĝenerala kutimo de dramistoj. Gra-

vis ne la enhavo de dramo, sed la talento de la aŭtoro de specifa versio. Distriĝo estis la celo de la spektantoj, kaj same kiel nun, la reputacio de la reĝisoro (Shakespeare) garantiis al la spektantoj kvaliton, eksciton, ĝuigan sperton.

La temo de *La vintra fabelo* estas familiara varianto de bone konata klasika temo: la Reĝo de Sicilio kredas ke lia edzino malfidelis al li kaj gravediĝis per la Reĝo de Bohemio. Kaj ŝin kaj ŝian naskotan bebon li ordonas mortigi. Sed la bebon trovas kaj prizorgas ŝafistoj. Kreskinte, la iama bebo estas belega virino. Filo de la reĝo de

Bohemio renkontas ŝin kaj ili enamiĝas. Dum la interaj jaroj la Reĝo de Sicilio ekbedaŭras sian mortigordonon malsaĝan. La reĝideco de ambaŭ gejunuloj evidentiĝas kaj ili feste geedziĝas; kaj krome montriĝas ke la laŭsupoze mortigita edzino de la Reĝo de Sicilio efektive plu vivas, tiel ke la dramo per feliĉego finiĝas.

Estas malverŝajne ke la esperanta versio de *La vintra fabelo* iam estos en teatro spektebla; sed amantoj de la verkoj de Shakespeare trovos ĉi tiun tradukon tre inda aldoni al nia dramliteraturo. □



• Recenzas via redaktoro

H. G. Wells: *La lando de la blinduloj*. 2a eldono, Rotterdam: Bero, 2006. 26p.

Takso: 🍷🍷🍷🍷

Wells lokigas sian rakonton en kaŝita monta landeto en la Andoj. Pro natura katastrofo, ĝi estis apartigita disde la cetera kontinento, tiel ke neniu povis eniri nek eliri. Mistera malsano afliktis la negrandan loĝantaron de tiu landeto, tiel ke ilia vidpovo nuligiĝis, iliaj idoj naskiĝis blindaj. Post kelkaj generacioj ĉio rilatanta al la kapablo vidi estis forgesita. Tamen la aliaj sensoj kompanse akriĝis. Ilia kapablo palpi, aŭdi eĉ plej etajn sonojn, flari, kc. fariĝis nekredeble pli granda ol ĉe ni vidpovuloj.

Montogrimpisto trafalas neĝfendegon, kaj trovas sin en tiu lan-

do de la blinduloj. Ĝiaj geloĝantoj certas ke li estas freneza, ĉar li konstante parolas pri “vido” kaj insistas ke lia “vidpovo” faras el li personon tre superan. Tamen malgraŭ multaj pruvprovoj fare de li, montriĝas ke ili per siaj akutaj sensoj povas ĉiam superi liajn vidperceptojn.

Iom post iom li enamiĝas kun knabino kies bela aspekto egalas al ŝia karaktera beleco. Ili volas geedziĝi. Sed oni insistas ke por ricevi permeson edziĝi, li devos esti blindigita. Kontraŭvole, li akceptas.

Preskaŭ lastamomente, ĉirkaŭrigardante, li konvinkiĝas ke vidi la belecon de la naturo, de la montoj, de la ĉielo, estas malperdende.

Li eskapas, reiras al la civilizacio, kaj miras pro sia iama preto akcepti blindiĝon.

La eldonisto metis *La lando de la Blinduloj*-n en sian *Serion uto-
pian* de libroj, kvankam mi multe dubas ke H. G. Wells konsideris ĝin kiel ion alian ol minora scienc-

fikciaĵo.

La stilo de la novelo estas tipe Wells-eca; do kiu amas la sciencfikcion de H. G. Wells, tiu trovos ĉi tiun eldonaĵon salutinda. Ĝi estas tre bone kaj klare presita, kaj komposteraroj maloftas. □

• Negrandaj informoj atentindaj

Anekdoto vera

de Donald Broadribb

Nia plej proksima najbaro en York havas, i.a., kvar anserojn. Ilia kriadado tre multe ĝenis nin, ĉar ĝi okazis preskaŭ konstante dum la tago, kaj kelkafoje dum la nokto.

Krii al ili ne helpis. Ili nur voĉbruis eĉ pli. Sed mia edzino elektis solvon! Unu matenon, elirinte en nian malantaŭan ĝardenon, ŝi vokis al la anseroj: “Bonan matenon, Anseroj!” Ili post tio iom pli malmulte voĉbruis.

Tion ŝi faris ĉiutage, kaj ĉiutage ilia voĉbruado malpliigis. Ĝis fine, kiam ŝi vokis al ili “Bonan matenon, Anseroj” ili tuj ĉesis brui.

Mi decidis ankaŭ tion provi. Mi unu matenon, kiam ili voĉkriadis, ankaŭ vokis al ili “Bonan matenon, Anseroj”. Post du-tri tagoj ili rekonis mian voĉon, kaj je mia alvoko ili tuj ĉesis kriadi.

Nuntempe, kiam mi eliras kaj ili komencas brui, mi nur vokas al ili “Bonan matenon, Anseroj” kaj ili tuj trankviliĝas kaj silentas. Evidente ili sentis sin solecaj, kaj scii ke konato proksimas trankviligas ilin.

Ŝajnas al mi, do, ke anstataŭ esti stultaj, anseroj havas inteligenton, kaj ke ankaŭ ili sociemas. □

Interesaĵo el Ĉinio

Ĉina Radio Internacia ne nur dissendas radioprogramojn ĉiutage per Interreto en Esperanto, sed ankaŭ eldonas interese ilustratan ĵurnalformatan dumonatan eldon-

aĵon nomitan *Mikrofone*. Ni rekomendas ke, se vi deziras senpage ricevadi ĉi tiun priradian informĵurnalon, vi kontaktu:

espradio@cri.com.cn. □

Korekto

Kun granda bedaŭro necesas sciigi ke la projekto *Esperanto-televido*, anoncita en nia januara numero, devis ĉesi. La ĉefaj kaŭzoj estis monmanko, manko de sufiĉa mate-

rialo elsendebla, manko de sufiĉaj kunlaborantoj, precipe de televizi-ekspertoj, multa entuziasmo sed ne multa kapablo. La entrepreno estis kuraĝa. Ĝis la! □

Kongreso 2007 de NZEA

La Kongreso de Novzelanda Esperanto-Asocio okazos de la 3a ĝis la 5a de februaro 2007. La Ekskurso dum Waitangi-Tago okazos la 6an de februaro

Urbestro vizitis la Manlian Klubon de Anthony Gaskell



La 17an de junio, Dr-o Peter McDonald, urbestro de Manly vizitis ni-an klubon. Organizite de

Eunice Graham, longatempa ano de la klubo kaj amiko de la urbestro, ni konigis al Peter Esperanton. Li estis surprizita ke ni havas tiel viglan klubon, 14 anoj ĉeestis. Li petis ke ni interparolu en la lingvo, por ke li sentu la ritmon kaj senton de Esperanto.

La foto montris Eunice-n maldekstre, Antonon Gaskell, prezidanto de la manlia klubo, la urbestron, kaj Igor-on Couto, prezidanto de kaj la NSKa Federacio kaj de AEA. □



• Interrete

Ĉu vi memoras nian iaman poeton Niĉjo Nicholas? Multaj liaj poemoj aperis en *The Australian Esperantist* 1987-1991. Nu, vi povas elŝuti pdf-on de lia poemlibro *Najlonkorda Liro* ĉe <http://www.tlg.uci.edu/~opoudjjs/Poems/najlonkorda.pdf>.

Kaj la libro *Esperanto – la nova latino de la eklezio* estas elŝutebla ĉe <http://www.u-matthias.de/latino/latina.htm>.

Krizo Por Esperanto en Aŭstralio de Henry Broadbent

Grava divido kreskis inter la membroj de la Estraro de la Aŭstralia Esperanto-Asocio post la Jarkunveno en januaro. Ambaŭ partioj havas siajn subtenantojn. Ĉi tio farigis afero de granda maltrankvilo al la Esperantistoj kiuj ĵus informigis pri ĝi. La Viktoria Esperanto-Federacio devigis nuligi sian oktobran kunvenon, ĉar iuj membroj estas tiom ĉagrenitaj ke ili ne povas renkontiĝi kun aliaj de la alia partio.

Multaj ek la interkomunikaĵoj okazis per la Reto per kiu oni povas tuj resendi respondon sen suface da konsiderado. Membroj kaj aliaj sendis insultojn, subsugestojn, vualitajn minacojn kaj diskutis aferojn sekrete. Doloroplenaj mesaĝoj estis senditaj kaj la situacio estas tre aĉa. Mi kredas ke la membroj bezonas scii pri la situacio kaj la kialoj de la militantaj. La tuta interakordo de la Aŭstraliaj Esperantistoj estas en danĝero.

La unuaranga kialo de la situacio ŝajnas esti kiel uzi la monojn de la AEA, kluboj kaj Federacioj efiĝe por ke Esperanto pli bone progresu. Ekzemple iuj fondusoj ne povas uziĝi ĉar la kondiĉoj estas tro severaj, kaj unu partio proponas ke AEA iĝu komerca firmao kun direktoroj anstataŭ estraranoj.

AEA havas ankaŭ ofenditan dungiton. Peno akordiĝi fiaskis ĉar la akordigistoj ne estas neŭtralaj. La estraro devos ripari ĉi tiun aferon per neŭtrala akordisto inter la du partioj.

Ankaŭ povas esti ke ni eble perdos la libroservon.

Mi opinias ke ambaŭ grupoj devus skribi al *ESK* la detalojn de siaj proponoj por ke ĉiuj povu pensi pri ili kaj voĉdoni dum la sekvonta jarkunveno. Ankoraŭ estas sufiĉa tempo por ke ambaŭ grupoj metu siajn argumentojn en la sekva eldono de *ESK*.

Intertempe la estraro devus arangi fizikan kunvenon en Melburno aŭ Sidnejo. Mi opinias ke ili devus havi neŭtralan, ne-esperantistan akordiston por prezidi la kunvenon. Mi petas, ne forgesu ke la celo de Esperanto estas paco ne milito. □

Komento de la redaktoro

La “krizo” temas pri iom furioza kverelo inter diversaj membroj de la estraro kaj krome aliaj orientbordaj aktivuloj de AEA, kiu erupciis lastatempe. Doni detalojn ĉi tie ne dezirindas. Kiel ĉiuj kvereloj, grandaparte temas pri emociplenaj akuzoj kaj malmulta racio. —[db]

Fari kion mi ŝatas, en kio mi kredas

Intervjuo kun Sandor Horvath, de Katja Steele



Sandor, plus studentoj: Gabriele Favalessa (Italio), Yi Jingyu (Koreo), Chan Junel (Ĉinio)

Sandor Horvath estas profesia instruisto, origine pri matematiko kaj de la rusa. Al ĉi-fakoj aldoniĝis poste la germana kaj laste la angla, la lingvo de lia elektita hejmlando Aŭstralio. De 1991 li instruis la anglan en UNISA (University of South-Australia), de 1997 laboras en CELUSA (Centre of English at the UNISA) en Adelajdo. Liaj studentoj estas eksterlandaj junuloj grandparte el Azio, venantaj por kelksemajnaj ĝis kelkmonataj perfektigaj kursoj. Krom zorgi pri ilia angla Sandor konatigas la junajn studemulojn ankaŭ kun Esperanto.

Kiam kaj kiel vi komencis informi en CELUSA pri Esperanto kaj instrui ĝin?

Mi mem konatiĝis kun Esperanto en 1986, sed vere entusiasmigis por ĝi nur post la somerkursaro en Melburno (1990). Esti esperantisto estas io alia ol esti parolanto de nacia lingvo. Esperantistoj iel aŭtomate emas propagandi sian

lingvon, varbi por ĝi, dum se vi lernas ekz. la hispanan, ne verŝajnas, ke vi faros same. Mi do ekinstruis la lingvon al malgrandaj grupoj de miaj studentoj post la Melburnaj spertoj, verŝajne en 2000.

Kio estis via ĉefa motivo?

Mi vidas, ke tiuj junuloj multajn jarojn lernas la anglan, vojaĝas al anglalingvaj landoj por perfektigi en ĝi, multe elspezas — sed ne kontentas pri la rezultoj. Ili havas precipe parolproblemojn kaj pro tio la denaskaj anglalingvuloj pensas, ke ili estas stultaj. Se la nedenaskuloj kaj la denaskuloj laboras grupe, la rezultojn prezentas la fluparolanto — denaskulo, kaj do li ricevas la laŭrojn, eĉ se la alia laboris pli. En Aŭstralio mem oni apenaŭ lernetas iom da fremdaj lingvoj kaj mi despli malŝatas, kiam oni arogantas al tiuj, kiuj eĉ se ili ne parolas flue, tamen multe penas alproprigi al si la anglan.

La fina venko ne vere motivigas min, sed estas jam sufiĉe da esperantistoj, por ke ni ĝuu la kuneston.

Ĉu vi havas apartajn gvidliniojn en la instruado de Esperanto, proprajn metodojn?

Kiun ajn lingvon mi instruas, mi restas la sama homo kaj aplikas ĉiujn miajn sciojn kaj spertojn. Por mi gravas krei amikan etoson, personajn rilatojn. Ni konu unu la alian, ne estu streĉiteco, ni ridu,

ludu, ekskursu. Anstataŭ lernolibroj mi preferas naturajn situaciojn, ofte neantaŭvideblajn, en kiuj la studentoj simple uzas la lingvon kaj eĉ ne rimarkas, ke ili lernas. Mia tasko estas krei tiujn okazojn, helpi trovi la homojn, kun kiuj ili parolu. Gravus, ke ankaŭ mi ĝuu kaj profitu kaj tial mi ekz. elektas ekskursi al interesaj lokoj.

Kiu via argumento por Esperanto ŝajnas esti la plej konvinka al la studentoj?

Verŝajne la lingva demokratio. Kaj la facileco – sed unue oni devas ĝin sperti. Poste ankaŭ la helpo ĉe vojaĝoj.

Kiom da studentoj vi taksas, kiuj konatiĝis kun Esperanto per vi?

Certe ĉiu almenaŭ aŭdis pri ĝi, ekz. ĉe la temo gramatiko. Proksimume 800 do ricevis la bazajn informojn, diversnivele lernis Esperanton eble 20 el ili. La plej bona “rikolto” estas la nunaj studentoj.

Kvar el ili plentempe partoprenis eĉ la dutagan Adelajdan vintrokursaron (3-4.junio). Kiel vi atingis tiun ĉi sukceson?

Ili volis viziti Aŭstralian-Adelajdan lernejon, mi do gvidis ilin al la elementa lernejo, kie instruas nia Esperanto-amiko Gordon Coleman. Liaj etaj Esperanto-lernantoj instruis al miaj studentoj – Esperanton! Alifoje ni ekskursis al komunuma ĝardeno kaj tie gvidis nin alia esperantisto – Nancy Roy! Post tiu ĉi sperto mi menciis, ke se iu interesiĝas pri Esperanto, mi pretas fari etan kurson. Post pli-

malpli 2 monatoj (10 lecionoj) da Esperanto unu el ili atingis nivelon, kiam li kapablis partopreni la 3a-gradan grupon de la kursaro kaj eĉ prezenti Esperanton al pli ol 100 studentoj dum prelego pri la problemoj de la angla.

Ĉu la instruado de Esperanto ne forprenas de tiuj junuloj la anglan?

Ili mem diras, ke ne. Mi samopinias, ili ja lernas Esperanton pere de la angla kaj do tiel lernante samtempe ambaŭ lingvojn. Esperanto kaj la esperantistoj ebligas al ili pli da konversacio, praktiko, la radikoj de Esperanto ofte samas kun tiuj de la anglaj vortoj. Mi mem kredas, ke la amuza kaj rapida lernado de Esperanto donas al ili memfidon, kiu helpas ilin ankaŭ en la lernado de la angla.

Kiel reagas je ĉio ĉi viaj kolegoj en la universitato?

Per ignorado. Ili konsideras nin stranguloj. Sed ili surpriziĝas, kiam la studentoj parolas-skribas pri Esperanto ĉe diversaj taskoj.

Kion vi konsideras via plej granda atingo en la laboro kun la studentoj?

Ke ili sufiĉe bone laboris kaj ke mi peris al ili agrablajn spertojn. Mi kredas, ke kelkaj el ili daŭrigos ankaŭ post la revojaĝo al siaj hejmoj. Ni iĝis bonaj amikoj kaj kun kelkaj el la antaŭaj grupoj mi daŭre restas en kontakto. Por mi estas ĝojo en si mem, ke mi havas la eblon fari kion mi ŝatas, en kio mi kredas. □

Honore al Adam Lindsay Gordon de Franciska Toubale

La unua seminario organizita de la Viktoria Esperanto Federacio por la jaro 2006 fariĝis omaĝo al la Aŭstralia poeto Adam Lindsay Gordon, pro la longedaŭra entuziasmo kaj admiro de nia membro John Adams

John opinias ke la nomo de Adam Lindsay Gordon havas sian lokon apud tiuj de Banĝo Paterson kaj Henry Lawson, kaj fondis kune kun la historiisto de la Tombejo Brighton, Travis Sellers, la Rememorigan Komitaton Adam Lindsay Gordon, kiu donis al si la taskon organizi ĉiujaran memorceremonion pri la morto de la poeto, la 24an de junio 1870.

Favora koincido estis ke la muzeo Ĉampionoj en la Federacia Placo en Melburno ĝuste je la sama periodo proponis ekspozicion de pentraĵoj pri ĉevalkonkursoj en la kamparo kaj deziris lanĉi libreteton de doktoro Helen W. Kinloch *Adam Lindsay Gordon: la ĉevalrajdanto kaj poeto*.

Ĉiuj tiuj projektoj kuniĝis en unu memorinda tago: Grupo de dek kvin esperantistoj renkontiĝis je la 10a matene ĉe la fama melburna rendevuejo: la horloĝoj de Stacidomo Flinders. Malgraŭ aŭ pro la malvarmeco, ĉiu energie piediris al la statuo de Adam Lindsay Gordon, skulptita de Paul Raphael Montford, apud la ŝtata parlamento, metis du korbojn da

floroj ĉe la piedon de la statuo kaj komencis blovi sabbobelojn en ĉiuj direktoj, memore pri liaj famaj versoj :

“La vivo estas ĉefe ŝaŭmo kaj bobeloj,

Du aĵoj staras kiel ŝtono

Afableco je alies zorgoj

Kuraĝo je siaj propraj”

Tiam John donis al ni informojn pri la vivo kaj la personeco de Adam Lindsay Gordon.

Pro tio ke la programo estis bone disvastigita per Radio ABC kaj per la ĵurnalo *The Age*, venis kelkaj homoj, kiujn alparolis la aktoro Geoff Dening, nia akompananto dum la tuta tago. Ankaŭ scivol-emaj preterpasantoj interesiĝis pri la okazaĵo. Heather Heldzingen kaj Lez Farkas blovis bobelojn

En la posttagmezo, dum la plenkreskuloj individue vizitis la muzeon Ĉampionoj, la infanoj aŭ blovis gigantajn sabbobelojn ekstere aŭ konstruis ĉevalojn per kartono kun la celo uzi ilin en la ombro de lampo. Poste prelegis profesoro Chris Wallace Crabbe, deklamis Geoff Dening kaj prezentis sian libreteton doktoro Helen W. Kinloch.

Ni travivis informoplenan tagon en ĝoja etoso. La pozitiva flanko de tiu evento estas ke la esperantistoj ne restis inter si, sed intermiksitis sin kun la admirantoj de Ad-

am Lindsay Gordon. Koran dankon al John Adams, la organizinto de la programo. Mi lasas al li la plezuron prezenti al ni sian ŝatatan poeton Adam Lindsay Gordon:

ADAM LINDSAY GORDON

1833-1870

de John Adams

Antaŭe la poetoj estis idoligitaj kiel herooj, sed hodiaŭ ni rekonas poeton per lia bona poezio. Gordon postvivis ĉi tiujn ŝanĝojn de pli ol cent jaroj kaj estas nun konata kiel kaj heroo kaj verkisto de bona poezio.

La Aŭstralia nacia poeto devenis de Skota Bienulo, li naskiĝis sur Portugala grundo en Acoroj kaj estis sendita en Anglujon. Li tiom embarasis siajn gepatrojn per sia senbrida konduto kaj per siaj rilatoj kun kanajloj kaj ĉevalvetantoj, ke ili ne povis iel ajn toleri lin kaj sendis lin al la Kolonioj, al Suda Aŭstralio kun leteroj cele lin prezenti al la bienuloj de tiu ŝtato.

Gordon alvenis ĉe Haveno Adelajdo je la dek kvara de Novembro 1853. Li ignoris la leterojn de prezentado kaj aliĝis al la Suda Aŭstralia Rajdanta Polico. Li pasigis du jarojn en la Rajdanta Polico, plejparte en la polica kazerno en Penola. En tiu tempo granda aktiveco okazis en Suda Aŭstralio ĉar oro estis trovita en Viktorio. La havenoj de Adelajdo, Robe kaj Urbo MacDonnell fariĝis vojaĝfinoj

por la enmigrantoj kiuj elektis eniri Aŭstralion tra la havenoj de Adelajdo, Robe kaj Urbo MacDonnell por eviti la pagon de imposto, truditan al orministoj en Viktorio. La ministoj surteriĝis en Suda Aŭstralio kaj marŝis tra veprejo, dezerto kaj arbaro al la viktoriaj orkampoj.

Elveninte el la fumaj, malpuragaj, densegaj anglaj urbegoj, Gordon alfrontis puran aeron, brilajn klarajn ĉielojn, stelajn noktojn kaj strangajn vegetaĵarojn kaj bestojn kiuj ŝancelis liajn sentojn.

Gordon havis mallongan vivon: dudek jarojn en Anglujo kaj preskaŭ dek sep jarojn en Aŭstralio. Gordon dum tiuj dek sep jaroj ĉiam esperis akiri sufiĉe da mono por reiri al Anglujo. Liaj poemoj grade komencis speguli la fruan Aŭstralian spiriton.

Gordon estis en la koro puritano. En lia menso estis absoluta diferenco inter bono kaj malbono, la postvivo per savo eterna aŭ damniĝo eterna, la signifo de la vivo, kaj ankaŭ li dubis pri la kialoj por mortigi bestojn sporte. Dise tra liaj poemoj estas etaj predikaĵoj pri virta vivo.

Gordon havis neniun ideon kiel administri siajn financojn, sed kasis sian teruran financon staton de sia edzino por ne maltrankviligi ŝin — tamen ŝi sendube sciis.

Unue, Gordon kare vivis, sed poste li devis prunti monon de siaj amikoj.

Gordon estis bonega rajdanto

de konkursĉevaloj en saltkurado kaj estis la heroo de sia tempo en la konkursomondo, pro siaj multaj venkoj. Je la deka de oktobro 1868 li venkis en tri saltkuradoj en unu posttagmezo. Multaj faloj elde ĉevaloj rezultis en kapaj kaj brustaj vundoj, kiam la sola kuracado estis ripozi.

Gordon havis melankolian inklinon kaj li fariĝis pli kaj pli deprimita post sia lasta malbona falo en marto de la jaro 1870 pro kapaj vundoj.

Lia sola infano, nomita Annie, mortis en la jaro 1868 je la aĝo de dek unu monatoj.

Gordon estis informita pri hereĉaĵo en Skotlando kiun li esperis ricevi sed la posedaĵo estis donita al alia parenco.

Je la dudek-tria de junio 1870

la eldonisto de Gordon donis al li fakturon por lia libro *Kamparaj Baladoj kaj Galopantaj Rimoj*, kiun li ne povis pagi.

Frue la sekvan matenon li kisis sian dormantan edzinon, kaj eliris la domon kun sia pafilo. Li iris al Hotelo Marine en Brighton kaj frapis sur la pordon sed la hotelestro dormis. Li rekomencis sian piediron al la marbordo. Kiam oni trovis lin tie li estis pafinta kuglon tra sian buŝon. Estis unu ŝilingo en la ĉapelo apud li. Lia tuta havaĵo.

La saman matenon la libro de Gordon estis en la librovendejoj.

Gordon estis idoligata ĝis proksimume 1930.

Lia populareco iom post iom malaperis ... ĝis hodiaŭ. □

Informoj pri la informoj pri la somerkursaro de Marcel Leereveld

Kun la julia ekzemplero de *ESK* vi ĉiuj ricevis la *Broŝuron kun la Aliĝilo*. Bonestu sendi tiun Aliĝilon baldaŭ, unue ĉar haveblas nur 60 dormoĉambroj, kaj due ĉar post la 1-a de Oktobro verŝajne haveblos nur dek dormoĉambroj.

Ekstra nokto

Ĉiuj partoprenontoj restantaj dum la tuta Kursaro devos pagi por du semajnoj (= entute \$630), kaj tial rajtos dormi kaj manĝi ekstran tagon/nokton. Se vi deziras uzi tiun

oportunon, vi devos informi min antaŭ la 1-a de oktobro ĉu vi deziras aŭ alveni je la 6-a de Januaro (anstataŭ la 7-a) kaj foriri je la 20-a de Januaro, aŭ ĉu vi deziras foriri je la 21-a de Januaro (anstataŭ la 20-a) kaj alveni je la 7-a de Januaro.

Infanoj

Mi nepre antaŭ la 15-a de septembro devos scii, ĉu vi intencas preni parton kun infano(j). Do bonestu baldaŭ diri al mi: aŭ ĉu vi

prenos parton kun via(j) infano(j) (kiom?) eĉ se la infanoj devos pagi por siaj dormĉambroj kaj manĝoj (= po \$630) (kvankam eble AEA subvencios la infanojn) aŭ ĉu vi prenos parton kun infano(j) (kiom?) nur se AEA pagos la restadkostojn (=dormĉambroj + manĝoj) por la infanoj. Vi ne jam bezonas (sed povas) sendi viajn Aliĝilojn.

Intensa Kurso

Bonestu diskonigi al viaj geamikoj ke ni intencas organizi mallongan *intensan kurson* por komencantoj dum Vendredo, Sabato, kaj Dimanĉo 5 kaj 6 kaj 7 Januaro.

La tuta kosto por ĉeesti tiun tri-tagan Intensan Kurson estas \$65. La partoprenantoj en tiu Kurso devos zorgi pri siaj propraj loĝado kaj manĝado. Ankaŭ tutkomencantoj de la tuta Kursaro rajtos ĉeesti, senpage, por poste esti en Nivelo 2.

Posttagmezaj Elektoj

Notu, kiam vi plenigos la Aliĝilon, ke vi povos indiki *du* elektojn, unu el la unua kaj unu el la dua kolumnoj. Bonestu informi min, se vi pretos gvidi unu (aŭ du) posttagmeza(j)n Elektaĵo(j)n dum parto aŭ la tuto de la Kursaro.

mleereveld@yahoo.com.au □

Reguloj por AEA kursaroj

de Marcel Leereveld

1. Kiaj, kiam, kaj kiom.
2. Somerkursaroj.
3. Kiuj decidas.
4. La Kursaroj.
5. Posttagmezaj aranĝoj.
6. La instruistoj.
7. Vesperaj aranĝoj.
8. Financaĵoj.
9. Asekuro.

(Notu: Por “li”, “lia”, ktp., legu ĉie “ŝi/li”, “ŝia/lia”, ktp.)

- 1.1 Unu el la celoj de AEA estas organizi Kursarojn. Ili povas esti iom ajn longaj, kaj okazi en iu ajn jartempo, kaj povas alpreni iun ajn formon.
- 1.2 Kvankam ĝis nun ne dezirata, oni povas organizi pli ol unu Kursaron dum jaro.
2. Kutime, ĉar plejmulte dezirate, la nura Kursaro en la jaro daŭras ĝis du semajnojn kaj oka-

zas en januaro. Ĝi tial nomiĝas Somerkursaro, daŭranta inter unu kaj du semajnojn. Se ĝi okazas dum malpli ol kvin tagoj, ĝi kutime formas parton de Kongreso (=konkursoj, paroladoj, ktp.), kiu kutime tiukaze enhavas ankaŭ la Jarkunvenon. Se ĝi daŭras pli longe, la Kongreso formas parton de la Kursaro, kaj kutime, kaj pro praktikaj kialoj la Jarkunveno

- okazas dum tiu Kursaro, plej ofte dum tri vesperoj.
- 3.1 En la Jarkunveno de AEA la membroj decidas ĉu havi Kursaron, kaj elektas la lokon, la longecon, kaj la datojn de la eventuale venonta Kursaro. Ili akceptas unu el la proponoj de lokaj aŭ provincaj grupoj organizitaj tian Kursaron
- 3.2 La Estraro elektas Respondeculon (Komisiiton por Kursaroj), kiu kunordigas kaj supervidas la organizadon de la Kursaro. Li estas respondeca al la Estraro kaj liaj decidoj superregas tiujn de la Loka Organiza Komitato. Ĉi lasta estas formita de la invitintoj al la elektita loko por Kursaro.
- 3.3 La Loka Organiza Komitato (se tia ekzistas) elektas inter si Rerezentanton, kiu interrilatadas kun la Komisiito por la praktika organizado. La L.O.K. kun konsilo de la Estrara Komisiito efektivigas la Regulojn sub n-roj 3-9. La Komisiito sankcias aŭ ne sankcias nemenciitajn ekstreajn aranĝojn de la L.O.K. La loka Rerezentanto rajtas tamen plendi al la Estraro pri decido de la Komisiito.
- 3.4. Se neniu grupo invitas la Kursaron, la Estraro povas mem, post sankcio de la Membraro en la Jarkunveno, organizi Kursaron ie ajn. En tia kazo la Komisiito povas peti la helpon de membroj ie ajn loĝantaj.
- 3.5. Se dum la jaro evidentiĝas, ke la de la Membraro elektita loko ne taŭgas, la Estraro serĉas alian lokon por la Kursaro. Se organizi Kursaron nenie eblas la celita Kursaro ne okazos kaj la proksima Jarkunveno decidos pri Kursaro en la sekvonta jaro.
- 4.1 Normale la (kutime kvarnive-laj) kursoj mem okazas en la du matenaj periodoj. Ofte la Nivelo de Komencantoj havas trian periodon en la komenco de la posttagmezo.
- 4.2 La Komisiito elektas la instruistojn por la matenaj klasoj, inter kiuj prefere almenaŭ unu eksterlandan. Tiuj instruistoj kutime instruas dum almenaŭ du periodoj (=3 horoj).
- 4.3 Ĉiu Nivelo havas du instruistojn, unu por la unua kaj alia por la dua periodo.
- 4.4 La Ekzamenprepara instruisto servu ankaŭ kiel anstataŭa instruisto en la matenoj, ekz. ĉe malsano de la normala instruisto.
- 4.5 Se estas sufiĉe da junaj infanoj (4 ĝis 12-jaraĝaj), okazas ankaŭ Klaso por Infanoj, en la matenoj. Ĝi havas nur unu instruiston, kiu devas esti oficiale kvalifikita por instrui infanojn.
- 5.1 En la du posttagmezaj periodoj (1½-pojn horojn) okazas diversaj esperantaj okupiĝoj, ekz. kantado, tradukado, ludado, verkado, persona helpado, fo-

- rumoj. Ĉiu partoprenanto do povas elekti du el la havigeblaj okupiĝoj. La elekteblaj fakoj posttagmeaj celas paroligi aŭ alimaniere spertigi la partoprenantojn pri Esperanto.
- 5.2 En la kadro de la elektitaj posttagmezaj okupiĝoj okazas ankaŭ preparklasoj por la Baza Ekzameno kaj por la Meza (kaj Alta) Ekzameno. Kandidatoj do povas prepari sin eĉ por du el tiuj ekzamenoj. La instruisto por tiuj klasoj estas membro de la Ekzamena Komisiono kaj do posedas almenaŭ la Superan aŭ la Altan Diplomon.
- 5.3 Je la finaj tagoj de la Kursaro okazas, dum la posttagmezoj, la Ekzamenoj por la Baza, Meza, kaj Alta Diplomoj. Ilin aranĝas la Komisiito por Ekzamenoj aŭ iu alia membro de la Ekzamena Komitato aŭ unu el la oficialaj lokaj Ekzamenistoj.
- 5.4 Dum la Somerkursaroj kutime organizatas ankaŭ kelkaj ekskursoj, escepte se la Kursaro okupas nur unu semajnon aŭ malpli.
- 6.1 Estas tre konsilinda, ke unu el la instruistoj por Nivelo 1 (komencantoj) estu kapabla instrui per la “rekta metodo”, dum la alia klarigas la gramatikon parte en Esperanto kaj parte en la angla lingvo.
- 6.2 Estas tre konsilinda, ke unu el la instruistoj por Nivelo 4 (ekspertuloj) estu spertulo pri la gramatika kaj lingvisma aspektoj de Esperanto.
- 6.3 Estas konsilinda, ke en Niveloj 3 kaj 4 unu instruisto koncentriĝas pri la literatura aspekto de la lingvo, dum la alia koncentriĝas pri la lingva (gramatika) aspekto.
- 6.4 La Komisiito konsultas la Ĉefekzameniston de AEA pri la lingva kaj instrua kapabloj de la Somerkursaraj instruistoj.
- 6.5 Almenaŭ unu monaton antaŭ la Kursaro ĉiu instruisto donas al la Komisiito sian instruoplanon, kaj akceptos konsilojn de la Ĉefekzamenisto pere de la Komisiito.
- 6.6 Krom la eksterlanda instruisto subvenciata el la speciala buĝetero de AEA ankaŭ la aliaj instruistoj povas esti fremdlingvanoj, se ili hazarde mempage vizitas Aŭstralion aŭ se ili daŭre loĝas en Aŭstralio.
- 7.1 La kongresaj aranĝoj en la Somerkursaroj organizatas de la Komisiito, sed pri la enhavo de la Jarkunveno respondecas la Sekretario de AEA
- 7.2 La vesperaj aranĝoj konsistas kutime el paroladoj, el la teatraĵ- kaj kantkonkursoj, kaj el la lastvespera Festmanĝo). Ankaŭ la Generala Jarkunveno de la Asocio okazas kutime en (ofte tri) vesperoj.
- 7.3 Dum la Festmanĝo disdonatas i.a. Atestiloj kaj Diplomoj.
- 8.1 Ĉiuj financaj traktoj faratas tra speciala konto ĉe la Kasisto

de AEA

- 8.2 La buĝeto konsistas el la registriĝsumoj pagitaj de la partoprenantoj, kiuj sumoj restu tiom malaltaj kiom eblas. AEA ne subvencias la Somerkursaron, escepte por unu eksterlanda instruisto, kies vojaĝo al kaj el kaj restado dum la Kursaro pagatos de AEA el ĝia kuranta konto. Aliaj enspezoj povas havebli el la superflua mono pro pli altaj luprezoj ol ŝarĝitaj al AEA
- 8.3 Plentempaj studistoj pagas pli malaltan registriĝon, dum infanoj ĝis 12-jaraĝo pagas nenion. Ill ĉiuj pagas plenajn loĝkaj manĝkostojn.
- 8.4 Partoprenantoj ne bezonas lui dormĉambbron en la Kunvenejo (kaj do ne pagas por tio) nek uzi la organizitajn manĝojn (kaj do ne pagas por ili).
- 8.5 Ĉe dusemajna Somerkursaro estas ebla preni parton en nur unu el la du semajnoj. Tiukaze la registriĝo estas malpli kosta, kaj la eventualaj loĝ- kaj manĝkostoj estas la duono.
- 8.6 El la enspezoj pagatas la restadkostoj de la kvar aŭ kvin instruistoj (ne tiu subvenciata de AEA), nome la tri el la kvar matenaj, kaj la ekzamenprepara instruisto, kaj eventuale la Infaninstruisto. Se la buĝeto ne sufiĉas, Niveloj 3 kaj 4 kunigu, kio rezultos en nur tri instruistoj por la matenaj klasoj.
- 8.7 Krom por la registriĝkotizo (kurskotizo), la partoprenantoj pagas mem por sia vojaĝo kaj por sia restado. La restadon organizas AEA trovante taŭgajn dormĉambbrojn kaj zorgante pri ĉiuj manĝoj dum la tago. La partoprenantoj krome aparte pagas por la speciala Festmanĝo kaj por la Ekskursoj.
- 8.8 La Kursarorganizantoj penas havigi la deziratan dormĉambbron por ĉiu partoprenanto, sed pro evidentaj tialoj ne povas garantii tion.
- 8.9 La organiza komitato ne donas aliajn subvenciojn ol tiujn por la kvar aŭ kvin instruistoj (ĉiu alia laboro por la Somerkursaro/Kongreso/Jarkunveno estas senpage volontula), sed AEA povas subvencii el aliaj fontoj iujn ajn partoprenantojn, ekz. neesperantistajn geinstruistojn intencantajn poste instrui Esperanton en siaj lernejoj.
- 9.1 La ekskursoj kaj la restado en la luitaj ejoj estas normale asekuritaj, sed por riskoj ekster tiuj la partoprenantoj devas, se ili volas, mem asekuri sin. AEA ne respondecas pri riskoj ekster la ekskursoj kaj ekster la luitaj kunvenejoj kaj loĝejoj.
- 9.2 La Estraro de AEA decidas ĉu ekstra asekuro bezoniĝas por la Kursaro. □

Preskaŭ pasis kvindek jaroj de László Farkaš

La 23an de oktobro 1956, dek unu jarojn post la dua mondmilito, mi estis juna, nur dekkvarjaraĝa. La vivo estis tre malbona, kaj malbone organizita en mia naskiĝlando, Hungarujo. La stalinista komunista partio kaj la registaro estis regataj de Soveta Unio: la estroj de la komunista partio MDG (Magyar Dokgozók Pártja), precipe de la sekretario Mátyás Rákoŝi, de Moskvo, post la dua mondmilito. La homoj kultis lin kaj la sekretpolicanojn, kiuj estis ĉie. La laboristoj estis malkontentaj. Kune kun la universitataj studentoj ili organizis paceman protestmarŝon en Budapeŝto je la 23a de oktobro 1956. Bedaŭrinde membroj de la sekreta polico komencis pafi al la protestantoj kaj multaj senkulpaj junaj homoj mortis.

Poste ankaŭ la rusoj pafis. Tiel finiĝis la batalo por libereco.



Imre Nagy
1896-1958

La 4an de novembro Imre Nagy, reformkomunisto, fariĝis ĉefministro. Sed la revolucio kaj batalo por libereco ne sukcesis ĉar la grandega ruĝa soveta armeo venkis kontraŭ la liberecbatalantoj.

Imre Nagy kaj la aliaj membroj de la nova registaro estis ekzekutitaj. Imre Nagy, kiu loĝis en Moskvo antaŭ la dua mondmilito, estis reformkomunisto same kiel Mikhael Gorbaĉov

Multaj homoj mortis dum la liberecbatalo, la 4an de novembro kaj la sekvajn semajnojn. Ĉirkaŭ 350 homoj estis ekzekutitaj kaj ĉirkaŭ 250 000 homoj eskapis en Aŭstrujon aŭ Jugoslavion.

Nun la 23a de oktobro estas publika festo en Hungarujo. Ĉu ĝi estas klasbatalo aŭ ne??? □



• Skribas la legantoj

Skribas Paul Desailly:

22 julio 2006:

Post paso de proksimume jardeko da penoj instrui niajn spiritajn principojn en Ĉinio mi sen la familio kaj kun bedaŭro hejmeniris antaŭ 2-3 tagoj al Aŭstralio kaj verŝajne por ĉiam devos forlasi mian bahaan postenon en tiu landego. Je la fino de la sesa jardeko de la pasinta jarcento, dudek jarojn antaŭ

mia bahaaniĝo kaj kontraŭ la deziroj de miaj karaj gepatroj, mi, stulta knabo, rifuzis konsideri bakalaŭriĝon, por spertiĝi kiel bilardisto. En ĉi lasta mi portempe sukcesis sed kontraŭ kosto de diplomitiĝo. Pli kaj pli la edukaj kaj registaraj aŭtoritatoj en Ĉinio insistas, same kiel en Japanio jam de longe, ke instruistoj de la angla el eksterlando mem estu almenaŭ diplomitoj. Rilate

al mia persona situacio tiu kompren-
ebla sento estas ironia pro mia aĝo
(apenaŭ nuntempe validas kion mi lernis
aŭ rifuzis studi antaŭ 35 jaroj en
universitato) kaj ĉar mia eksdunganto
volas ankoraŭ redungi min pro miaj
multaj spertoj kiel instruisto sed ne
pretas pro la nova dekreto. Velanta nun
klopodas en Ĉinio havigi elmigran per-
meson kaj enmigra vizon. Nia fami-
lieto — Velanta, trijara Eddie kaj
mi — post kelkaj monatoj ree kuniĝos
en Aŭstralio — *Inŝallah*. Ni petas viajn
preĝojn.

Ni optimismas laŭ la vortoj de dok-
toro Zamenhof: “Post doloro venas suk-
ceso.” □

Skribas Miranda Lutz:

Tre konfuzis min legi pri la negativa
vidpunkto de Franciska (*ESK* 82, p.20)
pri profesieco, speciale post mia vizito
al ŝia leciono en Melburno dum julio ĉi-
jare. Laŭ mi, Franciska prezentis la
lecionon tre lerte kaj profesie. Estus
bonege se pli el ni povus instrui Espe-
ranton en pli da lokoj kaj plej “profesie”
ĉu ne? Mia opinio estas “uzu la profesie-
con kiam ni bezonas ĝin”. □

Nova klubo en Torquay Vic

de Carol Lutz
fotoj de Andrew Lutz



Kelkaj membroj de TEKK ĉe
Gastejo de Anita en Torquay

Salutojn al la AEA membraro el la
Esperanto-Kafo-Klubo Torquay.

Nia klubo estis fondita je la ko-
menco de ĉi tiu jaro kaj kunvenas
la unuan sabaton monate (escepte
de decembro kaj januaro).

Ni havas 10 membrojn (junajn
kaj junkorajn) kaj ĝuas diversajn

programojn. Ni speciale ĝuas kiam
Miranda ĉeestas kaj instruas!



Miranda Lutz instruas laŭ la metodo de la
Universitato de NSW

Torquay estas bela, malgranda,
marborda urbeto kaj ni kore bon-
venigas gastojn. Nia retpaĝo mon-
tras pli da informo je:

www.torquay.esperanto.org.au. □

Libroservo: ĉu financa profito estas la plej grava afero?

de Nicole Else

Unu el la AEA estraranoj sugestis, ke oni ne plu havu libroservon en Aŭstralio. Aliaj estraranoj ŝajne subtenas lin.

Kial? Ĉar la libroservo ne faras finanĉan profiton. Ĉu ne estas ege multaj kialoj por havi libroservon en Aŭstralio krom la financa profito?

Se la aŭstralia libroservo ne plu ekzistus, esperantistoj devus mendi siajn librojn rekte de UEA en Nederlando. Personoj kiuj ne havas komputilon ne trovos tiun solvon tre praktika. Krome estas la pagoproblemoj. Ne ĉiuj ŝatas uzi kreditkarton kaj estas ege koste sendi internacian ĉekon.

Alia problemo estas ke UEA donas rabaton por mendo de almenaŭ 3 ekzempleroj. La libroservo ja kutime mendas almenaŭ 3 ekzemplerojn kaj do ricevas la rabaton. La libroservo pagas por la ŝipendokostoj de la libroj kaj aldonas iomete al la kosto de la libroj por fari etan profiton. Tamen la rezulto estas, ke la libroservo de AEA povas vendi la librojn pli-malpli je la sama prezo kiel UEA. Se la esperantistoj devus mendi rekte de UEA, ili devus aldoni al la kosto de la libroj la altajn kostojn de aviadilsendo, krom se ili pretas aten-

di pli ol du monatojn.

Krome UEA ne havas tempon por bone respondi al demandoj. Kutime ili respondas per nur unu frazo. Ĝis nun mi ne hezitis preni iom da tempo por respondi al demandoj kaj do respondis detale, kiam mi pensis, ke tio necesas.

Sed laŭ mi grava argumento por havi libroservon estas la propaganda avantaĝo de tio. Imagu, ke iu kontaktas nin kaj diras, ke li/ŝi ŝatus aĉeti lernolibron aŭ vortaron. Se ni respondas, ke ne eblas fari tion en Aŭstralio, ke li devas mendi ĝin el Eŭropo, ĉu tio donas bonan impreson pri Esperanto?

La libroservo havas ankoraŭ grandan stokon da libroj. Kio okazus pri ili, se la libroservo fermiĝus? Laŭ mi ne ekzistas rapida maniero vendi ilin.

Mi pensas, ke tamen pli kaj pli da personoj aĉetos librojn de ni, pli kaj pli da personoj uzos nian surretan vendejon kaj do supozeble la malprofito de la libroservo malgrandiĝos iom post iom.

Se vi opinias, ke AEA devus plu daŭrigi la libroservon, bonvolu skribi al la AEA estraro. La reta adreso estas:

estraro@esperanto.org.au. □

Libroservo: necesega por ni de Donald Broadribb

Iam AEA/NZEA havis bonegan libroservon — kiam ĝin prizorgis Tom Elliot. Lia morto lasis nin sen unu el la plej gravaj servoj de AEA.

Kiam oni pripensas la aferon, ĝuste kion ja provizas AEA al siaj membroj kontraŭ ilia kotizpago? Revuo jes; eblo partopreni (kontraŭ pagoj) en la Somerlernejo/Kongreso. Kaj...?

Individuoj kiuj membras en AEA faras tre indajn kaj laŭdindajn agojn por Esperanto en Aŭstralio. Bona ekzemplo estas la nova speciala kurso en Universitato de NSW. Sed tio ne estas entreprenado de AEA.

Ĉiumonate publikiĝas novaj libroj en Esperanto. Nefacile oni informiĝas pri ili — nur se oni estas unu el la tre malmultaj legantoj de la revuo *Esperanto* de UEA, aŭ (hazarde) vidas recenzon allogan en *ENK*...aŭ eble (sed ne verŝajne) aŭdas rekomendon faritan de iu amiko aŭ alia konato.

Libroj en Esperanto tre malmulte disvendiĝas. Tial, (escepte de lernolibroj kaj vortaroj), averaĝe presiĝas inter nur 400 kaj 600 ekzempleroj de nova libro.

Nu, ne ĉiu persono amas legi. Eĉ en la angla lingvo multaj personoj neniam legas libron. Legi en Esperanto estas malfacile por multaj personoj, ĉar ili ne tute bone re-

gas la lingvon. Malgraŭ tio, mi vidas ĉiumonate anoncojn pri la apero de tre legindaj kaj havindaj verkoj. Sed kiel oni aĉetu ilin? (Ĉar mankas pruntobibliotekoj esperantaj en Aŭstralio.)

Nu, se oni *hazarde* havas konton ĉe FEL (Flandra Esperanto-Ligo), aŭ ĉe UEA, oni povas facile mendi novan libron. Ĉar mi verkas por la magazino *Monato*, mi havas propran konton ĉe FEL¹, kaj facilas por mi [kontraŭ mia honorario!¹] aĉeti librojn ĉe FEL.

Kiom da aliaj AEA-membroj en Aŭstralio tamen havas konton ĉe FEL aŭ ĉe UEA? Verŝajne malpli ol deko.

Se oni interrete aŭ per ordinara poŝto mendas libron el Eŭropo, oni devas kun la mendo sendi pagon. Nu, oni povas aĉeti internacian poŝtmandaton aŭ internacian bankoĉekon tiucele, sed necesas pagi tre grandan ekstran pagon al la banko aŭ poŝtoŝticejo por tio — krome oni devas enkalkuli la sendokostojn por la librosendo el Eŭropo al Aŭstralio. Ensume, temporaba kaj por multaj personoj nefacila afero, ĉar bankobranĉoj malaperadas el Aŭstralio, kaj ATM-oj ne povas provizi la bezonatan servon.

Aliflanke, se la Libroservo de

¹. *Monato*, eldonata de FEL, estas preskaŭ la sola periodaĵo en Esperanto kiu pagas al siaj aŭtoroj!

AEA oportune havas en sia stoko ekzemplero(j)n de la dezirata libro, la aĉeto estas tre facila. Kaj, kiel atentigas Nicole, la suma prezo ne estas pli alta ol tiu pagenda se oni individue mendas la libron ĉe FEL aŭ UEA.

Tamen — — — en ĉi tiu numero de *ĜJK* aperas recenzoj de du novaj verkoj: *La vintra fabelo* de Shakespeare; kaj *La lando de la blinduloj* de H.G. Wells. Ĉu la Libroservo de AEA jam havas kaj povas provizi tiujn librojn al legintoj de la recenzoj? Nu, efektive, ne — nur se oni aparte kaj speciale petas al la Libroservo akiri ilin.

Laŭ mia opinio, la Libroservo de AEA devus aŭtomate ricevi 3 ekzemplerojn de ĉiu nova esperantolingva verko, por ke niaj leg-

antoj povu efektive mendi kaj ricevi novajn librojn. Sed tio necesigas tute novan politikon flanke de AEA: **ke AEA ekzistas por servi siajn membrojn**. Specife, por provizi al siaj membroj tion, kion ili ne povas alimaniere havigi al si. Revuo, jes. Somerlernejo, jes. *Eblon aĉeti librojn, nepre jes!*

Kompreneble tio kostus monon. Sed kiam mi rigardas la ĉiujare eldonatan konton de AEA, mi vidas ke AEA havas multmil dolarojn ripozantajn en bankoj. Ne temas pri ĉu AEA **povus** provizi unuaklasan libroservon al siaj membroj sed pri la demando ĉu ĝi *vere volas* esti profesinivela asocio *servanta siajn membrojn*. Aŭ ĉu ĝi preferas resti esotera grupeto sen socia valoro? □

Laŭ nia AEA statuto, la celoj de la Asocio estas: According to our AEA constitution, the aims of the Association are:

(a) disvastigi la uzadon de la Internacia Lingvo, Esperanto,

(b) kreskigi inter siaj membroj fortikan senton de solidareco kaj disvolvi ĉe ili komprenon kaj estimon por fremdaj popoloj,

(c) zorgi pri la kunagado de esperantistaj organizaĵoj,

(d) okazigi tutlandajn kongresojn kaj aliajn kongresojn kaj konferencojn.

(a) to spread the use of the International Language, Esperanto,

(b) to cultivate among its members a strong sense of solidarity and to develop in them understanding and esteem for foreign peoples,

(c) to foster cooperation among esperantist organisations,

(d) to hold national congresses and other congresses and conferences. Miranda Lutz □

Helpo bezonata

mesaĝo perita al ni de Penny Vos

Mi estas Ruben' Torres, delegito de Kalio (Cali), Kolombio kaj mi havas peton... Se vi povas iel helpi min, mi tre dankos vin.

La afero estas jena: Mi havas 17-jaraĝan filon kiu vojaĝos al Aŭstralio por studi la anglan. Ni elektis tiun landon ĉefe ĉar la kostoj estas multe pli malaltaj ol tiuj de aliaj anglalingvaj landoj pli proksimaj de Kolombio (nekred-eble, ĉu ne?).

Sed okazas ke ni (mia edzino kaj mi) esploras la eblecon trovi malmultekostan gastejon por nia filo. Li iros al familio kiu estu aliĝinta al la programo de Internaciaj Interŝanĝoj de la registaro de Aŭstralio, sed, estus ja bonege se iu esperanta familio estus membro de tiu gastiga rondo.

Nia celo estas ŝpari iom da mono per la restado de nia filo en familio de esperantistoj. Ni konscias ke la peto eble estas iom komplika, sed ni fidus pri la povo

de nia lingvo.

Pro tio ke ni serĉas alternativ-ojn por malaltigi la koston de la restado de nia filo, ĉiuj aliaj rekomendoj aŭ konsiloj viaflankaj estus ja bonvenaj.

Tre eble la temo estas nova por vi (same kiel por ni), sed la fakto ke vi loĝas en Aŭstralio donas al vi pli ampleksan rigardon pri la tuta afero.

Se vi havas konatulon kiu scias ion pri tiu ĉi temo aŭ se vi povas iel esplori la aferon en via urbo, mi tre dankus vin.

Retadreso:

rddtorresa@gmail.com.

Penny Vos respondis:

Mi plusendos vian demandon al nia landa grupo por ke iu kiu loĝas en taŭga urbo povu respondi se interesita.

Certe la daŭro de la restado estos grava informero. Kiom vi antaŭvidas?

La dua Medalo de Toleremo

8–9 jun 2006 en Bjalistoko okazis solenaĵoj okaze de enmanigo de la Medalo pri Toleremo al profesoro Władysław Bartoszewski. La medalon starigis Fondaĵo Zamenhof kaj la kunkreintoj de la Fondaĵo — UEA, PEA, TEJO, ILEI, Bjalistoka Esperantista Societo, Universitato de Bjalistoko, Komunumo Bjalistoko, Bjalistoka Vojevodo.

La unuan fojon tiu medalo estis enmanigita al la Papo Johano Paŭlo la Dua en 1999. En januaro 2006 estis decidite honori per la medalo profesoron Władysław Bartoszewski.

[El *La ondo de Esperanto*]

Radio 3ZZZ



Karl Egger kaj Miranda Lutz



Karl Egger, Miranda Lutz, kaj Franciska Toubale

Ĉiusemajne Radio 3ZZZ en Melburno dissendas unuhoran programon en Esperanto. Jam de multe da jaroj establita, la Esperanto-programo aŭskulteblas per Interreto ĉe:

www.3zzz.com.au.

Ĉiulunde posttagmeze estas nova programo por la semajno.

Muziko, intervjuoj, kursoj, kaj ĉio alia por ke via aŭskultado estu distra, informa, agrabla. Eblas aŭskulti la aktualan programon je kiu ajn horo, dum ĉiu tago de la semajno. Provu...ĝuu...kaj ankaŭ vi mem povas sendi sonbendon por aŭdigo en la programo, se vi deziras. □



Melburna Esperanto-Asocio, 3 julio 2006
← Ken Rolls, Karlo Egger, Heather Heldzingen, Ivan Heldzigen, Marcel Leereveld, Miranda Lutz, Esther Parris, Alida Leereveld

La enkonduko de Esperanto en Indonezio de Dianne Lukes

Antaŭ la komenco de 2004 Renato Corsetti instigis la Oceanian Komisionon enkonduki Esperanton en Indonezio.

Grupeto de Aŭstraliaj Esperantistoj ekpreparis retan kurson por instrui Esperanton al Indonezianoj.

Je la fino de 2003 Hazairin Junep malkovris Esperanton kaj eklernis ĝin en novembro, 2003.

Ĉe la AEA Kongreso, januaro 2004, mi unue aŭdis pri la volo enkonduki Esperanton en Indonezio.

Ĉe la Oceania Fakkunsido dum tiu Kongreso mi proponis kontakti Hazairinon kaj helpi lin lerni Esperanton kiam mi revenos al mia laboro en Japanio. (Mi havas kuzon, kiu loĝas en Bali kaj mi tiam jam havis flugbileton tra Bali al Japanio, do mi eĉ povus viziti Hazairin kiam mi revenos al Aŭstralio je la fino de septembro.)

Do mi ja kontaktis Hazairinon rete preskaŭ ĉiusemajne por helpi lin lerni Esperanton kaj diskuti la movadon, reveninte al Japanio. Tiam mi aranĝis resti kun mia kuzo en Bali dum 3 monatoj por helpi Hazairin fari planon pri kiel enkonduki Esperanton al siaj samlandanoj. Mi faris ĝin ĉar mi estas psikologo kaj instruisto profesie kaj jam havis dekjaran sperton kiel estrarano de AEA.

Hazairin rapide lernis la lingvon kaj verkis la unuan lernolibron por instrui Esperanton al Indonezianoj dum 2004. Mi unue flugis al Java de Bali por viziti Hazairinon je la fino de oktobro kaj li jam povis paroli kaj kompreni Esperanton sufiĉe bone kaj flue.

Mi restis en la domo de Hazairin dum nur 3 tagoj. Tiam mi vidis kiel li loĝis hejme, kiel li estis respektata en sia komunumo kaj kion li volas kaj povus fari por Esperanto. Ni multe parolis

pri la eblecoj kiujn li povus uzi por enkonduki Esperanton kaj kion li bezonus por fari ĝin.

Post tio mi revenis al Bali kaj ni daŭris komuniki rete pri la plano kaj firmigis ĝin. Antaŭ ol reveni al Aŭstralio, je la 20a de decembro, mi revenis al Jogjakarta por certigi ĉion, kion ni diskutis en la plano kaj Hazairin montris al mi multon kiun li povus fari por prepari ĉion por la enkonduko de Esperanto.

Ses tagojn post mia reveno al Aŭstralio terura cunamo okazis en Indonezio, kiu mortigis pli ol 6,000 homojn, kaj milionoj da viktimoj perdis hejmojn. Tiu katastrofo ne tuŝis Hazairinon rekte, sed li estis voluntulo por pli ol 20 jaroj, do li devis fari multon por helpi la viktimojn kaj eĉ li helpis disvastigi informon pri Esperanto ĉar li daŭris informi ĉiujn pri Esperanto kiam li helpis ilin dum la unua duono de 2005.

En 2004 AEA invitis Hazairinon por ĉeesti somerlernejon en Adelaide, januaro, 2005, kiel gasto. Bedaŭrinde, la Aŭstralio registaro ne donis al li vizon, do li ne povis iri por prezenti la planon pri kiel li povus enkonduki Esperanton en Indonezio ĉe la AEA Kongreso 2005.

Do, mi mem prezentis la planon (vidu skizon de la plano sube). La AEA estraro kunvenis poste kaj konsentis subteni la agon finance per \$AUD5,000 por 2005. \$2,000 estis por komputilo, kostoj por provizi ĝin kaj aliaj materialoj, kaj \$3,000 estis honorario por Hazairin, por doni al li iom da tempo, kiun li povus uzi por Esperanto anstataŭ labori 12 horojn aŭ pli, ĉiutage, por povi nutri sian familion de 5 personoj. La \$AUD5,000 estis nur tri kvaronoj de la \$US5,000, kiu estis bezonata, sed Hazairin faris ĉion, kion li proponis, kvan-

kam tio estis tre malfacila por li.

Dum la dua parto de 2005 Hazairin laboregis diligente por fini la verkon de la unua Esperanto—Indonezia vortaro, kiun li ja finis je novembro, 2005. Hazairin ankaŭ daŭris distribui informon, paroli kaj skribi pri Esperanto. Li ankaŭ fondis la unuan Esperantan Bibliotekon en Indonezio sed bezonas pli da eperantaj libroj, ĵurnaloj ktp por plenigi ĝin.

Denove, Hazairin estis invitita al la AEA Somerlernejo, kiu okazis je januaro, 2006. Denove li ne povis iri, pro la reguloj de la Aŭstralia registaro.

Mi denove preparis raporton pri ĉio, kion Hazairin faris dum 2005 kaj kion li volis fari en 2006 por prezenti ĉe la AEA Kongreso. Kvankam la estraro de AEA esprimis sian subtenon de la agado de Hazairin morale, tamen bedaŭrinde ili ne volis daŭrigi la financon subtenon de la agado en Indonezio.

Mi volis ke ni petu al aliaj Esperantaj instancoj, kiaj UEA, Oceania Komisiono, Azia Komisiono ktp. sed Hazairin ne konsentis. Li diris, ke ĉiuj scias kion li faradis/as/os kaj se ili volis doni ion al li, tiam li akceptos la helpon, sed li ne niam almozpetos ion kaj ne permesis min fari ĝin. Do, li ankoraŭ ne ricevis financon subtenon de iu instanco dum ĉi tiu jaro.

Li volis verki la vortaron Indonezia-Esperantan en 2006 sed ankoraŭ ne havis sufiĉan tempon por eĉ komenci ĝin. Ankaŭ mankas mono por reeldonigi la esperantan lernolibron indonezie aŭ eldoni la vortarojn kiam ili estos pretaj.

Hazairin volis instruiĝi per esperanta kurso ie kie li povus gajni atestilon, kiun li bezonas, por paroli pri Esperanto oficiale en lernejoj aŭ universitatoj ktp. Sed neniu aranĝis ion por li.

Nun Hazairin kaj lia familio mem estas viktimoj de la elementoj. Antaŭ tri monatoj vulkano ekerupciis nur 12km for de lia domo kaj daŭras vomi venenajn gasojn ĝis nun. La lafo estas

nur 6km for de lia domo nun. Je la fino de majo, terura tertremo okazis proksime al la alia flanko de lia domo. La domo daŭras stari sed estis iomete rompita kaj multaj aĵoj en la domo estis difektitaj aŭ detruitaj. La tria katastrofo okazis ĉi tiun monatom en lia loko, kiam alia cunamo batis ĝin. Ĝi ne tuŝis lin rekte, sed li denove helpis la viktimojn.

Eĉ dum tia tempo, Hazairin helpis min fari ĉi tiun raporton kaj preparis la liston de novaj Indoneziaj Esperantistoj kaj subtenantoj, kiun mi aldonis sube.

Kiel la plano por Esperanto en Indonezio estis farita

Antaŭ ol Hazairin kaj mi komencis krei la planon por enkonduki Esperanton en Indonezio mi kolektis informon pri la situacio tie. Mi parolis kun Indonezianoj kaj aliaj kiuj loĝis en Indonezio dum multaj jaroj. Mi volis scii kiaj estus tiuj, kiuj volus lerni Esperanton. Mi trovis, ke la plejpartoj de la loĝantoj estis tro okupita por gajni sufiĉajn nutraĵojn por siaj familioj, ke ili ne havis tempon fari ion, kiu ne helpus ilin gajni monon. Tiuj, kiuj povus lerni ĝin estas: 1. Turismaj gvidistoj, kiuj povus gvidi esperantistojn. 2. Pacemuloj, kiuj ŝatas la internan ideon de Esperanto. 3. Instruistoj, kiuj komprenas la pedagogian valoron. 4. Infanoj, kiuj havas gepatrojn, kiuj volas malfermi la mondon por siaj geinfanoj. Ktp.

Kion Hazairin bezonas por efektiviĝi la planon

Tempo: Antaŭ ol Hazairin aŭdis pri Esperanto, li uzis sian tutan tempon por zorgi kaj nutriigi sian familion, kaj por preĝi.

Mono: Por aĉeti komputilon kaj pagi kostojn por instali kaj uzi ĝin. Mono por Hazairin mem permesas lin uzi la ŝparitan tempon por fari ion por Esperanto.

[Daŭrigota en la sekva numero de *ESK*]

Kiel Kontribui al Esperanto sub La Suda Kruco

Ni akceptas eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan materialon. Ni preferas ricevi kontribuojn per e-poŝto. Surpaperaj tekstoj devas esti klare tajpitaj per freŝa rubando. Tajpu sur nur unu flanko de ĉiu folio, kun ekstra spaco inter ĉiuj linioj. Netajpitajn manuskriptojn ni ne akceptas.

Limdato por la novembro-decembra numero: 15a de oktobro 2006

La redaktoro rajtas redakti, korekti kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo. Laŭbezone teksto povas esti mallongigita.

Esperanto Sub La Suda Kruco

P. O. Box 643 • York WA 6302 • Aŭstralio
esk@esperanto.org.au



La Aŭstralia Esperanto-Asocio

143 Lawson St • Redfern NSW 2016 • Aŭstralio
<http://www.esperanto.org.au/>

Prezidanto: **Igor Couto** | prezidanto@esperanto.org.au

Sekretario: **Miranda Lutz** | sekretario@esperanto.org.au

Kasisto: **Stephen Pitney** | kasisto@esperanto.org.au

Membreco: \$40 por individuo aŭ klubo [+ \$5 por familiano(j) ĉe la sama adreso].

Por studento aŭ pensiulo: \$25. Asocia membreco: \$10.

Pagu al Libroservo de AEA | libroservo@esperanto.org.au



La Novzelanda Esperanto-Asocio

P.O. Box 8140 • Symonds St • Auckland 1035 • Novzelando
<http://www.esperanto.org.nz/>

Prezidanto: Bradley McDonald | bradley.m@extra.co.nz

Kasisto: Jackie Fox

Sekretario: Howard Gravatt | hgravatt@ihug.co.nz

Membreco: \$40 por individuo, \$50 por geedza paro; \$10 por studento aŭ junulo
(<20-jara: Klubo: \$1 por ĉiu ano

Sendu vian kotizon al la Kasisto ĉe la asocia adreso

Abonoj ekster Aŭstralio kaj Nov-Zelando kostas €24,00. Pagu ĉe UEA al la konto ael-w de la Libroservo de Aŭstalia Esperanto-Asocio

Wholly printed in Australia.

Typeset by Donald Broadribb, PO Box 643, York WA 6302.

Printed by Monash University, Wellington Road, Clayton Vic.

esperanto sub

LA SUDA KRUCO

if undeliverable return reply paid to:

D. Broadribb • P. O. Box 643 • York WA 6302 • Australia

Print Post Approved:

PP631048/00005

POSTAGE
PAID
AUSTRALIA

**SURFACE
MAIL**